

Ora Ĵurnalo

Numero 58, Januaro 2023



Foto: Anna Silvén.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Oleg Shupliak Gallery.....	25
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Oleg Shupliak – rimarkinda pentristo kaj artista.....	26
Espeporko meditas.....	3	Birdobservantoj neniam paŭzas.....	27
Kiam disvastiĝas polusnokto.....	2	La arbokolombo – Ringduvan.....	28
Novjara saluto de Walter.....	4	Ringduvorna – La arbokolomboj.....	29
La Novjara Sonorilo – Nyårsklockan.....	4	Fajro en la malantaŭo.....	29
Ankoraŭ pri la Sankta Luĉio-tago 13 dec.....	5	Pri kio oni ridis en la jaro 1904.....	30
La jaro.....	6	La kaviaro de Kalle – Kalles Kaviar.....	31
Zamenhof-festo en Vieno, la 17an de decembro.....	7	Kio okazus se Esperanto iĝus oficiala lingvo de EU?.....	32
La Esperanta muzeo de Vieno transprenas la arkivon de la Esperanto-Asocio.....	7	Veckovisa esperantokurser online!.....	32
Esperanto en Aŭstrio, 2022.....	9	Libro por elŝuti – La junulino el Stormyr.....	33
Senegalo, lando de la Teranga.....	11	Pensoj antaŭ la venonta kristnasko 2023 aŭ Aventuro en la Gotenburga nokto.....	34
La Senegalaj regionoj.....	12	Kiel interesigi matematikistojn esplori pri la logiko de Esperanto?.....	35
La kastosistemo en Senegalo.....	13	Henri Masson, franca verkisto.....	36
E-kursoj en la Universitato de la Tria Aĝo..	14	Ingegerd: Kiam sonis novjaraj sonoriloj.....	37
Arne Karlsson kaj Vieno.....	17	Utopi – Utopio.....	37
Belaj bildoj, sed el kiu lando?.....	19	Feliĉan Novan Jaron!.....	38
La Ora Trezoro de Košice.....	19	Esperanto alte flugas.....	38
Ne forgesu la Okcidentan Saharon!.....	23		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com
kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32,
ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝaranĝo: Andreas
Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuadojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.





Espeporko meditas: Adiaŭ 2022 – Bonvenon 2023!



- ✧ La nova jaro 2023 estas la Jaro de la **Kuniklo** en la tradicia ĉina luna kalendaro. Homoj esperas, ke la mondo povos venki ĉiujn obstaklojn kaj kuri pli rapide kaj salti pli alte kiel kuniklo.
- ✧ **Kio okazis en 2022?** Rusio atakis Ukrainon. Pekino havis la Vintrajn Olimpikojn, Kataro havis Futbalan Mondpokalon. La monda ekonomio malboniĝis. Energia krizo ekis. Kovimviruso restis en la mondo. Kaj – Ora Ĵurnalo fariĝis kvinjara.
- ✧ Redakti Ora Ĵurnalon signifas ke oni ĉiam lernas ion novan. Ekz: kiom da svedoj scias, ke **la svedo Arne Karlsson donis sian nomon al tramhaltejo en Vieno?** Vieno estas temo de ĉi tiu numero. En la Esperantomuzeo okazis festo pro la Zamenhofa tago.
- ✧ Pri la ukraina pentristo **Oleg Shupliak** mi sciis nenion. Torben Svendsen en Danio rakontas pri li kaj nun mi ekscias ke se oni zorge spektas liajn pentraĵojn, oni malkovras ke la vizaĝoj ne nur estas vizaĝoj..... kaj ke la naturo ne estas nur naturo.... legu pli en ĉi tiu numero! Ne maltrafu spekti la enigmajn bildojn en Optical Illusion, Art By Oleg Shupliak –



ligilo al Jutubo troviĝas en la artikolo.

- ✧ Kaviaro ne nur estas la luksa rusa kaviaro, sed ankaŭ la plej simpla **kaviaro de Kalle** – sveda invento!
- ✧ Laŭdire **Slovakio** estas bela lando. Kiel gustuma provaĵo Josef Kříž, en Ĉeĥio, sendis bildojn kaj iom poste ankaŭ artikolon pri Ora Trezoro kun multe da historiaj informoj.
- ✧ **Ne forgesu Okcident-Saharon**, Lena Thunberg diras. Nekredeble ke ĝi ankoraŭ estas okupata de Maroko!
- ✧ Ne risku vian vivon – nek sur glaciaj vojoj, nek sur tro krutaj vojoj. Lasse Granat rakontas **pri riska biciklado** en sia juneco.
- ✧ **Gotenburgo** ĉijare ĉiam devas havi lokon en Ora Ĵurnalo, ĉar la urbo festas sian 400:an datrevenon en 2023 – du jarojn pli malfrue pro la pandemio. Ĉu la urbo havas tian imponan aerbalonon kiun Ingegerd publikigis? Krome ŝia edzo kaj unu el la filinoj faris balonvojaĝon – sed tiam ne troviĝis Esperantobalono.
- ✧ **Fine la redaktantoj de Ora Ĵurnalo deziras al vi prosperan ĝojan 2023 kun multe da artikoloj por Ora Ĵurnalo! 😊 /Siv**

Kiam disvastiĝas polusnokto kaj neĝvualo kovras tersurfaco, tiam ekflugas ĉielaj lampoj: miloj da lumiloj kaj – malantaŭ ili – ree miloj da lumiloj.

Homido sur sia eta stelo admiras la grandiozan brilon. Ie fore por ni nevidebla universo eble tie... ie... iu alia... sur sia stelo... sian propran ĉielplafonon mirrigardas.

El De tago al tago de Aira Kankkunen

Novjara saluto de Walter



Jaro 137 de la Esperanto-erao!

Novjaran saluton sendas al vi (Siv) kaj al la kunlaborantoj de Ora Ĵurnalo – Walter el Vieno

Walter Klag ja estas ofta kontribuanto al Ora Ĵurnalo. De tempo al tempo li ankaŭ instruas nin pri svedaj aferoj 😊. En ĉi tiu numero ni

lernas pri svedo, kies nomo troviĝas sur tramhaltejo en Vieno.

Do, la gotenburga klubo deziras al Renate kaj Walter bonegan jaron 2023!

/Siv



La Novjara Sonorilo – Nyårsklockan



Alfred Tennyson (1869–1919) per sia poemo *Ring Out, Wild Bells* eldonita en 1850, inspiris Edvard Fredin traduki ĝin el la angla al la sveda.

Siv kompilis retan informon:

La novjara sonorilo (angle: *Ring Out, Wild Bells*) estas poemo de la angla poeto Alfred Tennyson el 1850. La sveda traduko, kiu enhavas la verslinion "Ring, klocka, ring" (Sonoru, sonorilo, sonoru) estis verkita de Edvard Fredin kaj estis publikigita en pluraj ĉiutagaj gazetoj en januaro 1889, la saman jaron kiam Fredin mortis nur 32 jaraĝa. En libroformo ĝi estis publikigita en 1890, jaron post la morto de Fredin.

Nyårsklockan (på engelska: *Ring Out Wild Bells*) är en dikt av den engelske poeten Alfred Tennyson från 1850. Den svenska översättningen, som innehåller versraden "Ring, klocka, ring" är skriven av Edvard Fredin och publicerades i flera dagstidningar i januari 1889, samma år som Fredin avled bara 32 år gammal. I bokform gavs den ut 1890, ett år efter Fredins död.

Ekde la mez-1890-aj jaroj, estas tradicio, ke la poemo estas deklamita publike je la bato de dek du ĉe la eksterdoma muzeo Skansen en Stokholmo, kio ofte estas elsendita en radio kaj televido. Anders de Wahl estas tiu kun la plej multaj publikaj novjaraj recitoj – almenaŭ 36 fojojn ĉe Skansen kaj plian numeron sole en la radio.

En la angla de Alfred Tennyson kaj la sveda de Edvard Fredin (la unua strofo):

Ring out, wild bells, to the wild sky,
The flying cloud, the frosty light:
The year is dying in the night;
Ring out, wild bells, and let him die.

Sedan mitten av 1890-talet är det tradition att dikten reciteras offentligt vid tolvslaget på Skansen i Stockholm, vilket ofta sänds i radio och TV. Anders de Wahl är den med flest offentliga nyårsuppläsningar – minst 36 gånger på Skansen och ytterligare ett antal endast i radio.

På engelska av Alfred Tennyson och på svenska av Edvard Fredin (första strofen):

Ring, klocka, ring i bistra nyårsnatten
Mot rymdens norrskenssky och markens snö;
Det gamla året lägger sig att dö...
Ring själaringning över land och vatten!

Ankoraŭ pri la Sankta Luĉio-tago 13 dec

konekse kun la artikolo de Ferenc Szilágyi en la decembra numero.

La Luĉio-tago povas esti spurita reen al la 4-a jarcento. Kristana festotago, ĝi festas la martiron Luĉio de Sirakuzo, kiu, laŭ legendo, alportis manĝaĵon al kristanoj kaŝiĝantaj en romiaj katakomboj kaj lumigis la vojon per girlando de kandeloj sur ŝia kapo.

Luĉio estas historia persono kiu estis naskita en Sirakuzo en Sicilio en la 280-aj jaroj. Estas ankaŭ historie pruvite ke ŝi iĝis martiro pro sia kredo. En la katolika tradicio, ŝi estas la patronsanktulo de blinduloj. En romia socio en tiu tempo, estis puninda esti kristano. Luĉio estis verŝajne mortigita en 304 dum la persekuto de imperiestro Diokleciano al la kristanoj. Do ŝi estis ne pli aĝa ol 20–25 jaroj.

Ŝi estis mortigita de sia fianĉo. La legendoj pri Luĉio estas multaj kaj la detaloj verŝajne estas pli-malpli veraj. Ŝi naskiĝis en riĉa familio kaj laŭdire eĉ kiel infano ŝi decidis neniam geedziĝi kaj doni ĉion, kion ŝi posedis al la malriĉuloj. Kiam Luĉio estis fianĉigita al viro kiu ne kundividis ŝian kristanan kredon, ŝi perdis sian menson. Legendo diras ke ŝi donis la doton al la senhavuloj kaj ŝia fianĉo



estis tiel kolerigita ke li malkaŝis ke ŝi estas kristano kaj ŝi estis mortigita per glavo.

La nokto de Luĉio estis danĝera. En Svedio, la 13-a de decembro estis speciala tago longe antaŭ ol venis la kutimo de Luĉio-procesio. La Luĉio-nokto estis kalkulita kiel la plej longa nokto de la jaro laŭ la Julia kalendaro. Laŭ popolkredo, tiu nokto estis danĝera, tiam

supernaturaj potencoj funkciis. Homoj restis maldormaj, kaj por ne ekdormi, ili manĝis manĝaĵon.

Luĉio-procesioj – gvidataj de Luĉio mem – estas senditaj per nacia televido kaj farataj en

antaŭlernejoj, lernejoj, flegejoj, preĝejoj kaj oficejoj tra la lando.

La hodiaŭa festo havas malmulte da rilato kun la martiro Luĉio.

/Siv

LA JARO

(el Esperanto-kurso de Vilho Setälä)

JANUARO

Per malhela januaro komenciĝas la jaro.

FEBRUARO

Eble vintra februaro plaĉas al la glitistaro.

MARTO

Venas brue tranĉa marto majstro de l' ventega arto.

APRILIO

Poste venas kun trankvilo mildaj pluvoj de aprilo.

MAJO

Sekvas majoj, florfraŭlino de l' monatoj la reĝino.

JUNIO

Nun somera mez', junio kun la rozo kaj lilio.

JULIO

Plena paco kun beleco estas de l' julio eco.

AŬGUSTO

Kun rikoltoj ĉe la brusto pasas la monat' aŭgusto.

SEPTEMBRO

Estas for somera suno kun septembro jen aŭtuno.

OKTOBRO

En oktobro la folioj falas kun malĝojaj krioj.

NOVEMBRO


Jen novembro tuj alvenas pluvoj kaj nebuloj ĝenas.

DECEMBRO

En decembro tagoj mallongiĝas, kaj la jar' finiĝas.



Zamenhof-festo en Vieno, la 17an de decembro



Alfred Heiligenbrunner estis la ĉeforganizanto de la zamenhofa festo en Aŭstrio. Ĝi okazis sabate, en la Esperanto-muzeo. La datreveno de la naskiĝtago de Zamenhof estas la 15a de decembro, sed pli praktike celebri ĝin sabate, la 17an.

Unue s-ro Tuidler el la Esperantomuzeo prezentis sian laboron. La arĥivo de Esperantaĵoj ja antaŭ kelkaj monatoj translokiĝis de Roterdamo (UEA) al Vieno (Esperantomuzeo). Tio estas honoriga afero, sed ankaŭ postulas pedantan arĥivadan laboron, skribas Alfred Heiligenbrunner.

Interrete troviĝas informo pri la Esperantomuzeo de Vieno:

La Esperanta muzeo de Vieno transprenas la arkivon de la Esperanto-Asocio



La enirejo al Viena Esperanto-Muzeo kun kolekto de planlingvoj. BILDO: UEPO.de
<https://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo>

La Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu mastrumas la Esperanto-Muzeon – Kolekto de Planitaj Lingvoj en Vieno – lastatempe transprenis la tutan arkivon de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kiu konsistas el 158 kestoj.

Ĝi estas unu el la plej ampleksaj kaj gravaj arkivoj de la mondo pri la lingvo Esperanto kaj la internacia Esperanto-movado.

La donaco enhavas multajn dokumentojn same kiel manuskriptojn, afiŝojn, fotojn kaj aŭdvidajn kolektojn. Tio celas ebligi histori-kulturajn studojn kaj histori-filologiajn esplorprojektojn pri la lingvo Esperanto. La nova materialo nuntempe estas disponebla

por uzo en la kolekto de planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj estas disponebla al interesitoj.

Inter la libroj troviĝas ekzempleroj de la unuaj Esperanto-lernolibroj en la araba (Kairo 1904), la greka (Samos 1907) kaj la kartvela (Tbiliso 1909), atentigante, ke Esperanto jam estis ricevita ekster la pli grandaj eŭropaj lingvokomunumoj antaŭ la unua mondmilito, komencante kun la Oriento kaj poste Okcidenta Eŭropo.

La arkivo enhavas ankaŭ grandan nombron da dokumentoj pri la historio de la Esperanto-Asocio kaj la Esperanto-Muzeo



Se vi venas al Vieno, vi ne maltrafu viziton al la malgranda, bela Esperanto-Muzeo ĉe Herrengasse 9 kun la plej granda kolekto de planlingvoj de la mondo. – Bildo: EUPO

de la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj ankaŭ la kolekton de planlingvoj.

La Esperanto-Muzeo ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko estis fondita en 1927 kaj estas unu el la plej malnovaj tradiciriĉaj lingvaj muzeoj en la mondo kaj unu el la plej gravaj institucioj tiaspecaj.

La muzeo, aŭ kaj la proksime rilata kolekto de planlingvoj, dokumentas ĉirkaŭ 500 planlingvajn projektojn.

Kun stoko de pli ol 150.000 eroj, inkluzive de 7580 arkivoj de persona kaj institucia deveno, la kolekto enhavas la plej grandan fakan bibliotekon de la mondo por Esperanto, aliaj planlingvoj kaj interlingvistiko.



La ekspozicioĉambroj de la Esperanto-Muzeo estas surprize malgrandaj kaj estas proksimume 80 kvadrataj metroj. La arkivo, kiu ne estas



alirebla por vizitantoj, estas la plej granda tiaspeca en la mondo. Bildo de UEPO.de.



La muzeo havas apartan legejon, kie vi povas esplori trankvile.

– Bildo: UEPO.de



Estas pluraj komputilaj stacioj tie. – Bildo: UEPO.

Por via plia studado vi povus uzi la jenajn ligilojn:

Esperantomuzeo

<https://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo>

Kolekto por Planlingvoj

<https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj>

Diĝitaj tekstoj

<https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj>

Diĝitaj dokumentoj pri Esperanto en ÖNB Digital

<https://onb.digital/search/494460>

Esperanto en Aŭstrio, 2022

Por Zoom-spektantoj kaj por publiko, sidanta en la Esperanto-biblioteko en Vieno, **Alfred Heiligenbrunner** rakontis pri Esperanto en sia urbo Graz:



Esperanta familio Maitzen, fotita la 11an de decembro 2022.

Kun kvar genepoj (Angelo, Paul, Jan, Pia) kaj tri filinoj (Stella, Lydia, Nina) kaj s-ro Maitzen.



Esperanto kun Walter Klag



Lernorondo en Vieno

Antaŭ la pandemio okazis multe da kunvenoj.



Esperantistoj en Vieno: Adam Wilkus el Pollando kun la lokaj esperantistoj Franziska Dodik kaj Alfred Heiligenbrunner.

La ĵurnalo *Esperanto aktuell*, de Aŭstrio.

Eble ĝi kaj Ora Ĵurnalo konatiĝus!

Alfred Heiligenbrunner petis al **Espoir Kasati**, DR Kongo, **Vida Kulikauskiene**, Litovio, kaj mi rakonti iomete pri niaj landoj kaj esperantoagado.

Do ...sekvus la prelego de Espoir pri Kongo..... Ĝi bedaŭrinde ne okazis, ĉar estis problemo pri la ligilo al Zoom. Fakte li ne estis en sia hejmo en Lubumbaŝa en DR Kongo sed en



Senegalo, kie li deĵoris ĉe la 8:a Afrika Kongreso.

Poste li sendis sian kontribuon al Ora Ĵurnalo. Li elektis informi nin pri Senegalo. Jen ĝi:

Senegalo, lando de la Teranga

Antaŭ ĉio, necesas scii, kion signifas la volofa termino "Teranga" en Esperanto. Ĝia esperanta signifo estas: Gastamo. Do, la frazo: «Senegalo, lando de la Teranga» signifas: Senegalo, gastama lando.

Senegalo, situas en latitudo varianta inter 12°C kaj 16°C gradoj norde, kaj ĝia longitudo

varias inter 12°C kaj 17°C gradoj. La duoninsulo Kabo-Verda estas la plej okcidenta punkto en Afriko. Senegalo ne havas multajn riverojn, ĝia klimato estas tipe sahela,* kun pluva sezono, junio-septembro, kaj seka vetero en alia tempo.

*) Sahel = duonseka zono sude de Saharo.

La sinsekvo de senegalaj prezidentoj de 1960 ĝis nun:

Léopold SEDAR SENGHOR: estris de aŭgusto 1960 ĝis decembro 1980.

Abdou DIOUF: estris de januaro 1981 ĝis marto 2000.

Abdoulaye WADE: estris de marto 2000 ĝis marto 2012.

Macky SALL: estras de Aprilo 2012 ĝis nun.





La Senegalaj regionoj

DAKAR La dakara regiono kovras 550 kvadratajn kilometrojn. Ĝi situas sur la



Kabo-Verda duoninsulo kaj limas kun la regiono Tieso oriente kaj kun la Atlantika Oceano norde, sude kaj okcidente.

ZINGUINCHOR La urbo Ziguinchor situas en la sud-okcidenta parto de Senegalo, borde de la rivero Casamance kaj ĉirkaŭ 70 kilometrojn for de la Atlantika Oceano, atingebla per buso.



DIOURBEL For de la maro, Diourbel limas kun la regionoj de Tieso kaj Louga norde, sude kun la regionoj de Tieso kaj Fatick, oriente kun la regionoj de Fatick kaj Louga kaj okcidente kun Saint-Louis.



La regiono **SAINT-LOUIS** havas 1 063 542 loĝantojn, kun 531 318 viroj kaj 532 224 virinoj kaj kovras 19 241 kvadratajn kilometrojn.



TAMBACOUNDA

Tre vasta, la regiono Tambacounda situas oriente de la lando. Ĝi estas la plej granda el la 14 senegalaj regionoj, sed la malplej loĝdensa, kun 812 075 loĝantoj.



KAOLACK La urbo situas 192 kilometrojn sude de Dakaro, ligita al Dakaro per la nacia vojo, ĉe la dekstra bordo de rivero Saloum, la unu el plej fruktodonaj arakidejoj en la lando. Kaolack estas tre utila vojkruciĝo inter Malio, Combre kaj Casamence kaj ankaŭ kun la cetera parto de Senegalo.



THIÈS Thiès aŭ Tieso, situas laŭ la fervojo Dakar-Niĝero. Fondita antaŭ jarcento, ĝia evoluo



korespondas al la starigo de stacidomo kaj kreado de fervojo liganta Dakaron al Bamako.

KAFFRINE Kaffrine estas loko situanta en la centro de Senegalo je 250 kilometroj for de Dakaro. Ĝi limas norde kun Diourbel kaj Louga, oriente kun la regiono Tambacounda, sude kun Gambio kaj okcidente kun la regiono Kaolack.



KEDOUGOU estas la plej sud-orienta granda senegala urbo, proksime al landlimoj kun Malio kaj Gvineo. Kedougou havas akvofalon altan je 50 metroj kaj grandan loĝdenson.



SEDHIOU kun popolnombro estimata al 151 331 loĝantoj. Ĝi situas ĉe la dekstra bordo de rivero Casamence. La regiono Sédihou situas 382 kilometrojn sud-okcidente de Dakaro.



LOUGA La regiono Louga situas nord-oriente de la lando kaj troviĝas je ducent tri kilometroj for de Dakaro. Ĝia popoldenso estas 106 162.



FATICK Norde kaj nord-oriente ĉirkaŭata de Thies, Durbel kaj Louga, sude limas kun Gambio, oriente limas kun la regiono Kaolack kaj okcidente kun Atlantika Oceano.

KOLDA Situas en la ekstrema suda parto de Senegalo kaj limas kun Velingaraa oriente kaj okcidente kun la regiono Sejour kaj norde kun Medina yoro Foula.

MATAM Situas en la nord-orienta parto de la lando, limas kun Saint-Louis norde, kun Louga okcidente, limas kun Kaffrine sud-okcidente kaj limas kun Tambacounda sude.

La kastosistemo en Senegalo

La kastoj korespondas precipe al sociaj-profesiaj kategorioj. Estas du ĉefaj grupoj:

LA GEER (nobelaro). Estas la senegala nobela kastoforono, sed estas super ĉiuj kastoj. La Geer povas esti militistoj, juristoj, proprietuloj de kampoj, profesoroj aŭ marabutoj.

LA NEENOOU aŭ **NYNYO**. Ili estas dividitaj en du kastajn grupojn: La **JEF-LEKKOU** aŭ man-metiistoj. Ili arigas la kastojn jene:

- TEUG: forĝistoj kaj fervendistoj
- UDE: ŝuistoj, botistoj, selo-fabrikistoj

La **GRIOT**-oj aŭ **GEWEL** (heroldoj). Ili estas rakontistoj kaj recitistoj, inspirantoj, sciigas pri tradicioj, mitoj, kantas tradiciajn

kanzonojn. Tamen notindas, kun la enveno de la koloniismo, ĉiuj tiuj profesiaj kastoformalaperis kaj ĉiu ekelektis sian profesion laŭ sia bontrovo kaj pasio.

La senegalaj konstitucie kodigitaj lingvoj

Multaj lingvoj estas parolataj en Senegalo, sed la jenaj estas rekonataj oficiale kiel lingvoj kodigitaj de la senegala konstitucio. Ili estas instruataj en lernejoj kaj universitatoj. Apude estas salutoj en tiuj lingvoj:

WOLOF kiu depruntas la prononcan manieron araban. Oni salutas:

- Asseilam Aleykum = wa aleykum salam
- Nanga def = magui fii

SERERE Oni salutas:

- Nafio = méxé-méxé
- Ninga = doutumna

PEULH Oni salutas: No mbada = diam tann

DJOLA Oni salutas: Kassumej = Kassumej keep

SONINKE Oni salutas: Hawoudiou = awouri/yawouri

MANDINGUE Oni salutas Kor ta nante = Ta nante.

La senegala laikeco

Senegalo estas reputacie konata danke al sia religia toleremo pro la islama-kristana kunvivemo kaj interkompreniĝo. La senegala popolo konsistas el 9% de tidianoj, 31% de nouridoj, 8% de Khade kaj ses elcentoj (6%) de layenidoj.

La kristanoj, principe katolikoj, kovras ne malpli ol 5%. Relative kompare al tiu cifereca superregado de la islama religio, la lando havas bonan reputacion pro sia toleremo kaj paca kunvivado islamanoj kun alireligianoj.

Malgraŭ la religiaj, lingvaj, regionaj kaj kulturaj diversecoj, Senegalo restas lando kun unuiĝinta popolo, kion karakterizas ĝia ŝtata devizo: «Unu nacio, unu celo, unu konvinko».

/ Hawa Diol, lernanto de la Esperanto-klubo de Dakaro

Espoir gvidis E-kursojn en Dakaro lige al la kongreso. La prelego de Vida okazis. Poste ŝi sendis bildojn al Ora Ĵurnalo. Jen ŝia rakonto:

E-kursoj en la Universitato de la Tria Aĝo

Vida Kulikauskiene el Litovio rakontas:

Ĉio komenciĝis pasintan someron dum varmega tago de mia feriado en kamparo.

Tute surpriza estis telefonalkvoko el Panevėžis Universitato de la Tria Aĝo (TAU).

”Ni bezonas Esperanto-instruiston en nia Universitato, ĉar gvidantoj de la Universitato volas ekde oktobro havi Esperanto-lecionojn en la fakultato pri lingvoj. Ĉu vi konsentas instrui niajn studentojn?”



Komence estis malgranda ŝoko, ĉar la propono estis tute neatendita. Ne tiom ofte okazas, ke E-kurson organizas en Esperanto-klubo, sed iu lernejo (des pli – Universitato!)

Do, senhezite mi konsentis iĝi instruistino de TAU.

Nur poste mi eksciis, ke gastante en la Universitato de la Tria Aĝo de Novy Sącz (Pollando), gvidantoj de nia TAU



Vida kun la esperantostelo.



ricevis proponon kunlabori kaj kiel kunlaborlingvon poloj proponis uzi Esperanton, kiu estis instruata en ilia Universitato.

Tio estis unu el gravaj kialoj, kial aperis Esperanto en TAU de nia urbo.

Krom Esperanto-instruado, mia celo en la Universitato estis popularigi la lingvon kaj montri, ke ĝi bone

funkcias en la vivo, estas utila kaj povas multe helpi en internaciaj rilatoj.

Kun nia lerno-grupo ni partoprenis lingvan kafejon de nia Universitato, tie instruis ĉiujn kanti en Esperanto, skribis kaj ricevis multajn bildkartojn de geesperantistoj en la tuta mondo.

Kiam TAU ekorganizis ekskurson al Bjalistoko, mi estis entirita en la organizadon. Mi interkonsentis pri helpo kun Bjalistokaj esperantistoj. Ili trovis kaj mendis al ni hotelon, proponis, kion viziti en la regiono, konsentis ĉiĉeroni nin. Malgraŭ tio, ke en la grupo de ekskursantoj estis multaj, kiuj lernas kaj komprenas la polan kaj nur kelkaj esperantistoj, mi petis ĉiĉeronadon en Esperanto. Ja ni gastos en Esperanto-lulilo!

Survoje al Pollando la ekskursantoj iomete "gustumis" Esperanton: lernis kelkajn vortojn



kaj utilajn frazojn, nombris, aŭdis E-versojn, kantis Esperantajn kantojn...

Nia ĉiĉeronino estis **Nina Pietuchowska**: fama E-instruistino kaj bonega historiistino de Bjalistoka regiono. Esperanto tre taŭgis al nia ekskurso, ja ni ne nur vizitis historiajn monumentojn de la multkultura regiono, sed ankaŭ promenis en Zamenhof-lokoj: kie li naskiĝis, vizitis lernejon, ludis kun amikoj. Ni estis en Esperanto-centro, eksciis evoluon de Esperanto en la urbo... Mi kaj tuta grupo ĝuis

bonegan ĉiĉeronadon, interesajn historiajn faktojn, kiujn rakontis Nina.

Ĉefe mi eksentis ke Esperanto restos en la kapoj de la vojaĝantoj, kiam ili komencis demandadi min signifon de iuj E-vortoj, kiujn ili aŭdis pli ofte. Ĉiuj konsentis, ke Esperanto sonas bele kaj lerni ĝin ne estas tro malfacile, parte eblas kompreni eĉ sen lernado, precipe, se persono jam parolas iujn fremdajn lingvojn.

Ĉion kronigis reveno hejmen, kiam kelkaj virinoj petis instrui frazon "Mi amas vin." Argumento estis, ke reveninte hejmen ili ja

devos rakonti pri la ekskurso kaj diri la frazon al siaj edzoj, kiuj pacience atendis ilin hejme...

Mi kredas, ke venontjare mia grupo certe pligrandiĝos (nun mi havas 12 lernantojn).

Reala renkontiĝo kun Esperanto certe donos fruktojn, ĉar tio estas la plej bona reklamo!

/Vida

Mia prelego estis miksaĵo de informo pri Svedio, pri Ora Ĵurnalo kaj pri esperanto en la gotenburga klubo. Jen kelkaj el la 43 bildoj.

Svedio havas nun pli ol 10 milionojnda enloĝxantoj kaj kiom da esperantistoj estas?



Esperanto-kluboj – estis 150 (1935).... Nun...restas 4.

- * Stokholmo UN- kaj aliaj grandaj tagoj (SEF)
- * Gotenburgo Libro-Foiro, Ora Ĵurnalo
- * Malmö propra ejo...biblioteko + Danio
- * Upsalo..... Eldonejo, IDO



• Ora Ĵurnalo

www.esperanto-gbg.org

Pri la gotenburga Esperantoklubo

- Kursejo.....somerkurso.....la Libro-Foiro.....Foje okazis, ke....



Reauxguro de Esperantoplatsen, Göteborg
Venu al Svedio kaj montru ke Esperanto estas viva lingvo!
La **Lingvo-kafejo** situas tie.



2003- UK en Gotenburgo

En Youtube ankoraux videblas nia Nacia Vespero



TRADICIOJ

- La kristana heredajxo
- La nacia tago, 6 junio
- Somermeza festo
- Sankta Lucio
- La tago de cxiuj sanktuloj



**6 JUNI
SVERIGES
NATIONAL-
DAG**



Ora Jxurnalø eldonigxas 11-fojojn jare
"La bibliotekøen Stannum" Ora Jxurnalø 5-jara



Bonvenon! al Svedio!
Bonvenon al Gotenburgo!
Plia informo en Ora Jxurnalo



Dankon!



Kelkaj reagoj de la publiko estis: Mi memoras la UK:n en Gotenburgo en 2003. Mi volus turisti en Svedio. Mi legos Ora Ĵurnalon.

Do, koran dankon al la organizantoj de la Zamenhofa tago pro la ebleco partopreni!

/Siv

Arne Karlsson kaj Vieno



Arne Karlsson (maldekstre) parolas en februaro 1947 kun la urbestro de Vieno Theodor Körner [téodor kerna]. Foto: Gemeinde Berg, 2413 Berg, Hauptstraße 33.

La metrolinia sistemo en Vieno kreskas. Post kelkaj jaroj funkcios la nova subtera linio U5. Unu el la novaj haltejoj havos la nomon "Arne Karlsson-Parko" ĉe la kruciĝo de Spitalgasse ("hospitala strateto") proksime de la Ĝenerala Hospitalo kaj Währinger Straße [veringa strato] en la 9a distrikto de Vieno. Tie estas la haltejo de sep tramlinioj. Kelkajn metrojn for de tiu parko troviĝas la kafejo AIDA, kie kvarfoje en la monato okazas Esperanto-renkontiĝoj.

Arne Karlsson naskiĝis 1912 en Stokholmo. Post la Dua Mondmilito, ekde 1945, li laboris

kiel estro de la helporganizo "Rädda Barnen Österreich" (Savu la Infanojn en Aŭstrio). Ĉiutage tiu organizo disponigis 70 mil manĝo-porciojn por la malsata Viena loĝantaro.

La 11an de junio 1947 Arne Karlsson plenumante siajn humanecajn deĵorajn devojn aŭtoveturis apud la aŭstria vilaĝo Berg [prononcu: berg], 60 km oriente de Vieno, ĉe la landlimo inter Aŭstrio kaj tiama Ĉeĥoslovakio, proksime de Bratislavo. Li vojeraris kaj komencis turni sian aŭton. Ĝuste tiam militpostena soldato de la rusa okupacia trupo false pensis, ke Karlsson estas spiono

kaj ekpafis al la aŭto, en kiu ankaŭ la edzino kaj la infano de Karlsson sidis. Arne Karlsson

estis trafita en la kapon postkranie kaj tuj mortis. Li estis nur 34-jara.



Ekde 1961 troviĝas memorejo por Arne Karlsson en Berg ĉe la Pressburger Straße (strato al Bratislavo, germane Pressburg).

En Vieno por la memoro al Arne Karlsson oni alinomis 1949 la tiaman Holz knecht-Parkon [holc-kneĥt] al Arne Karlsson-Parko. Ĝi estas unu el la plej grandaj verdaj oazoj en la 9a distrikto de Vieno. La areo estas ĉirkaŭ 12 500 m².

Karlsson-monumento en Berg, Suba Aŭstrio (Niederösterreich).

Sub la parko troviĝas la tiel nomita Memoriga Bunkro, kiu estas publike alirebla. Dum la »

Dua Mondmilito (1939 ĝis 1945) ĝi protektis ĝis 800 personojn dum bombardado.



La estonta haltejo "Arne Karlsson – Park" de la konstruata metrolinio U5 en la 9a distrikto de Vieno, Währinger [veringer] Strato 45. Fonto: Wiener Linien.

Guido Holz knecht (1872–1931) estis tre fama radiologo, universitata profesoro kaj ĉefkuracisto en la Ĝenerala Hospitalo en Vieno. En 1932 post lia tragika morto tiu parka areo ricevis lian nomon kaj sube de parkarboj bronzan buston, kiu montras la kuraciston.

Origine en la mezepoko sur la loko de tiu parko troviĝis hospitalo kaj ekestis apude tombejo por pestmortintoj en la jaro 1679. Inter 1858 kaj 1860 la Komunumo Vieno konstruis domon por helpobezonaj, maljunaj, malsanaj homoj. 1928 oni malkonstruis tiun domon kaj faris parkon. Plano de alta domo ne estis realigita.

Ligiloj – pri Holz knecht:


<http://himetop.wdfiles.com/local--files/guido-holz-knecht-s-monument/Guido%20Holz-knecht%27s%20monument%2C%20Vienna%20-%202001.JPG>

– pri la monumento en Berg:

https://www.gemeindeberg.at/Lebensraum_Berg/Sehenswuerdigkeiten/Denkmaeler

Renate kaj Walter Klag, Vieno, Aŭstrio

Belaj bildoj, sed el kiu lando?



El Slovakio venas la bildoj, senditaj de Josef Kříž, Ing.

La Ora Trezoro de Košice

Helpe de retaj informoj kompilis kaj esperantigis Josef Kříž, Ĉeĥa respubliko

La Ora Trezoro de Košice estas aro da 2.920 oraj **moneroj**, tri oraj **medaloj** kaj ora **renesanca ĉeno** malkovrita dum la fosado de fundamentoj por nova konstruaĵo de Financa

Direktorejo en Košice en 1935. La unika kolekto, kiu datiĝas inter la 15-a ĝis la 17-a jarcentoj, estas unu **el la plej grandaj malkovritaj oraj trezoroj en la mondo.**

Strukturo de la ora trezoro

La trezoro estis metita en renesancon kupran skatolon en formo de pano, kiu konsistas el du interligataj bovloj. La supra bovlo estas ornamita per gravurita ĉasmotivo. La masiva renesanca ĉeno longas 2,14 metrojn kaj pezas 590 gramojn.



La trovaĵo enhavas tri orajn medalojn. Du el la jaroj 1526 kaj 1544 kun motivo de reĝo Ludoviko Jagellon (1506–1526). La plej rara estas la tria el la jaro 1541. Ĝi estas verko de **Kryštof Fus** (?) kaj estas ĉevalmedalo de reĝo **Ferdinando la 1-a de Habsburg** (1503–1564).

Inter la moneroj estas unu, kiu ne konvenas en la aron de aliaj tiutempaj moneroj. Ĝi estas antikva monero de **trakia nacio**. Tamen, ĝi ankaŭ povas esti imito de monero de la **kelta nacio**. Aliaj tiutempaj moneroj estas hejmaj (Hungario, Transsilvanio), kaj de eksterlanda deveno (Nederlando, Bohemio, Silezio, Aŭstrio, Germanio, Pollando, Italio, Svedio kaj Hispanio). Ili venas de ĝis okdek malsamaj eŭropaj mentoj.

La nombro da la moneroj de individuaj ŝtatoj, aŭ specialaj teritorioj estas jenaj:

- Transilvanio (nun teritorio en Rumanio) – 257
- Hungario – 1181
- Nederlando (provincoj kaj urboj) – 1016
- Ĉeĥaj landoj – 26
- Silezio – 22
- Aŭstrio – 24

- Ĉefepiskopejo de Salzburg – 31
- Germanio (ekleziaj sekularaj bienoj, urboj) – 195
- Pollando – 113
- Svedio – 7
- Danio – 8
- Anglio – 1
- Belgio – 1
- Francio – 2
- Italio – 22
- Hispanio – 13

La origino de la trezoro

La plej juna monero de la trezoro devenas de la monfarejo

Kremnica de la jaro

1679. Surbaze de

tio la kaŝado de la

trezoro povas esti

datita al la jaroj

1680–1682. Laŭ la

konsisto de la

moneroj en la

trezoro, oni povas konkludi, ke ĝia posedanto

estis riĉa figuro – eble subtenanto de la

Habsburgoj. Tion pruvas ankaŭ la loko, kie la

trezoro estis kaŝita – en la administra

konstruaĵo de la Komerca Ĉambro, t.e. la ĉefa

financa institucio kun jurisdikcio por Supra

Hungario. La posedanto kaŝis la valorajojn

sub la kela etaĝo pro timo de ŝtelo.

Sortoj de la trezoro

En 1935, la origina baroka konstruaĵo de la

Komerca Ĉambro estis disfalgita por fari

lokon al la nova financa estraro. La laboristoj

kiuj malkovris la trezoron emis komence

alproprigi ĝin kaj vendi ĝin. Tamen,

malkaŝinte ilian intencon, la trezoro en sia

ne-rompita konsisto estis direktita al la

Ĝenerala Financa Trezoro en Bratislavo,

poste al la Centra Ŝtata Trezorejo en Prago.

En la jaroj 1941–1942, la trezoro estis



prilaborita de numismatika fakulino Emanuela Nohejlová-Prátrová (1900–1995) en la Nacia Muzeo en Prago. Ĉar pluraj landoj estis interesitaj pri la trezoro dum la Dua Mondmilito, la trezoro estis kaŝita en 1943 en du bone malkaŝitaj lokoj ekster Prago.

Ĝi revenis al Koŝice por ekspozicio en 1956 kaj poste nur en 1967, sed ne estis taŭga loko

por ĝia konstanta loko en la devenurbo. Tial, en 1969, granda monŝranko estis konstruita en la kelo de la tiea ĉefkonstruaĵo de la Orientslovaka Muzeo. La ekspozicio de la Ora Trezoro de Koŝice estas malfermita al publiko ekde 1970. La trezoron mi vidis propraokule en 1982.



Klarigoj kaj aldonaĵoj al la teksto

Koŝice estas la dua plej popolriĉa urbo en Slovakio kaj la natura metropolo de la orienta Slovaka regiono (vidu la mapon). Ĝi estas la sidejo de la Konstitucia Tribunalo de la Slovaka Respubliko kaj la sidejo de la aŭtonomia regiono Koŝice. En la urbo loĝas 229.040 da loĝantoj, tial ĝi estas unu el la plej grandaj urboj en Slovakio.

Ludoviko la 2a de Jagiellon (1506–1526) – Reĝo de Bohemio kaj hungara kaj moravia margrafo. Lia patro estis la ĉeĥa kaj hungara reĝo Vladislav la 2a de Jagelon, kies patrino estis la franca Grafino Anna de



Mapo de Slovaka respubliko: okcidente la ĉefurbo Bratislava, oriente la urbo Koŝice. Sube la urbo Koŝice – aktuala bildo.



Foix kaj Candale, kiu "pagis" la naskiĝon de la longe atendata vira heredanto de la trono per propra vivo.

Ferdinando la 1-a de Habsburg (1503–1564) – Reĝo de la Sankta Romia Imperio, Sankta Romia Imperiestro, Reĝo de Bohemio kaj Hungario, kaj Arkiduko de Aŭstrio. Liaj gepatroj estis la Habsburga Filipo la 1-a "La Bela" kaj la hispana infanino Jana "La Freneza". La pli maljuna frato Karolo la 5-a iĝis la reĝo de Hispanio en 1516 kaj la romia imperiestro en 1519.



Ludoviko la 2a de Jagiellon (1506–1526)

Trakio estas vasta historia teritorio situanta en la oriento de la Balkana Duoninsulo (mapo sube). Hodiaŭ, ĉi tiu regiono ampleksas la teritorion de tri landoj: Bulgario, Grekio kaj Turkio. Trakio estas lavita de la akvoj de tri maroj: Nigra, Egea kaj Marmara.

Keltoj estis la granda grupo da hindoeŭropaj popoloj el Eŭropo, karakterizitaj per la uzo de keltaj lingvoj kaj aliaj kulturaj similecoj. La historio de antaŭkelta Eŭropo kaj la specifa limado de la keltoj laŭ etnaj, lingvaj aŭ kulturaj trajtoj estas neklara kaj kondiĉigita de konjekto (mapo sekvapaĝe).




Ferdinando la 1-a de Habsburg (1503–1564)



Transilvanio – estas historia lando situanta en la nuna Rumanio.

Monfarejo Kremnica – ĝi estas unu el la plej malnovaj ankoraŭ ekzistantaj entreprenoj kaj la plej malnova ankoraŭ ekzistanta monfarejo en la mondo. La urbo Kremnica ricevis la privilegion establi monfarejon la 17-an de oktobro 1328 de la hungara reĝo Karlo Roberto la 1-a de Anĵuo.

La unuaj monfaritaj moneroj estis arĝentaj hungaraj groŝoj. Pli postaj oraj moneroj ankaŭ estis monfaritaj surbaze de la padrono de moneroj de la Itala urbo Florenco kaj tial ili estis nomitaj florinoj. Ili baldaŭ komencis nomiĝi **dukatoj**.



